

- 14389 3-foje **trakcirkvitlimo ĉe disforkiĝo**
 3-foje **disfarkiĝa liberigpunkto**
 14510 4-foje **trakcirkvitsekcio trans trakokonverĝa limpunkto**
 2-foje **trakcirkvitsekcio en postsignalila sekurecdistanco**

Kunsido de UIC-Terminologia grupo

17/18-an de Oktobro 2013 okazis kunsido de UIC-Terminologia grupo kun mia partopreno en Frankfurto ĉe Majno. Entute ĉeestis 16 personoj el 12 eŭropaj landoj. *Rosalinde Taucher (UIC)* petis min prezenti prelegeton pri "Esperanto en *RailLexic*".

Tie mi esprimis nian ĝojon, ke ni ekde pli ol 20 jaroj povas terminologie kunlabori - kun samaj rajtoj kaj devoj. Mi parolis pri niaj koncernaj motivoj por daŭra pluevoluigo de Esperanto-faklingvo. Post skizo de nia labormetodo kaj de kvanto da rezulto mi prezentis per projekciilo du ekzemplojn de prilaboritaj nocioj, montrante Terminaran Kurieron kaj la koncernajn paĝojn en la terminaro *RailLexic*.

Mi konstatis, ke la partoprenantoj plene respektas nian fakan laboron. Do tre bona reputacio.

UIC promesis, ke en 2014 finfine aperos reta versio de *RailLexic*, abonebla de ĉiuj interesatoj. La abonprezo estos ne tiom alta kiel tiu de CD-ROM-disko. Eventuale eĉ eblos 7-taga senpaga rigardo. En la programaro ne plu estos indikataj ŝlosilnumeroj. La CD-ROM-enhavo estos vendata ne plu kiel disko, sed kiel reta deŝargado.

Kelkaj novaj taskoj

03332 Sistemo, ĉe kiu motoro rekte, do sen intera transmisiilo movas radakson.

bulgara	<i>движение на право (без трансмисия)</i>	itala	<i>comando diretto</i>
ĉeĥa	<i>přímý pohon</i>	kroata	<i>izravni pogon</i>
dana	<i>banemotordrev</i>	pola	<i>napęd bezpośredni</i>
franca	<i>entraînement direct</i>	rumana	<i>antrenare directă</i>
germana	<i>Direktantrieb</i>	slovena	<i>direktni prenos moči</i>
hungara	<i>tengelyhajtás</i>		

terminproponoj:

- 1) **movo rekta (sentransmisia)** (kiel ĝis nun)
- 2) **radaksmovo rekta (sentransmisia)**
- 3) **radaksmovo sentransmisia**

09038 Fervojserva trajno destinata garantii sekurecon kaj kontroli bonan funkciadon de instalaĵoj, antaŭ permeso de komercaj trajnoj sur la trako.

bulgara	<i>осигурителен влак</i>	itala	<i>treno staffetta</i>
ĉeĥa	<i>předvoj</i>	kroata	<i>siguronosni vlak</i>
dana	<i>sikringstog</i>	pola	<i>pociąg pilotujący</i>
franca	<i>train-balai</i>	rumana	<i>tren antemergător de siguranță</i>
germana	<i>Sicherungszug</i>	slovena	<i>ščitni vlak</i>
hungara	<i>biztosító vonat</i>		

terminproponoj:

- 1) **trajno sekuriga** (kiel ĝis nun)
- 2) **trajno damaĝpreventa**

PIV: **preventi** Antaŭmalhelpi (malbonon, malsanon, damaĝon ktp).

09048 Fervojserva trajno por transporti materialojn, ilojn kaj laboristojn al kaj de konstruejoj sur eksterstacia sekcio de fervojlinio.

bulgara	<i>работен влак</i>	itala	<i>treno de cantiere</i>
ĉeĥa	<i>pracovní vlak</i>	kroata	<i>radni vlak</i>
dana	<i>arbejdstog</i>	pola	<i>pociąg roboczy</i>
franca	<i>train de chantier</i>	rumana	<i>tren de lucru</i>
germana	<i>Arbeitszug</i>	slovena	<i>delovni vlak</i>
hungara	<i>munkavonat</i>		

terminproponoj:

- 1) **labortrajno** (kiel ĝis nun)
- 2) **trajno laborejserva**
- 3) **trajno konstruserva**

11391 Vetursinsekvo de veturilo inter du determinitaj punktoj, konsistanta el akcela inercia kaj malakcela fazoj, bildigata en veturdiagramo.

ĉeĥa	<i>rychlostní profil</i>	itala	<i>diagramma della velocità</i>
dana	<i>kørselsprofil</i>	kroata	<i>vozni ciklus</i>
franca	<i>cycle de marche</i>	pola	<i>cykl jazdy</i>
germana	<i>Fahrzyklus</i>	rumana	<i>cinematică a circulației unui tren</i>
hungara	<i>sebesség diagram</i>	slovena	<i>hitrostni profil</i>

terminproponoj:

- 1) **veturparametroj** (kiel ĝis nun)
- 2) **veturciklo**

PIV: **parametro 1** Grando, kiu estas konstanta dum iu studata procezo, sed kiun oni povas tamen ŝanĝi.


ciklo 1 Sinsekvo de okazoj, kiuj regule ripetiĝas laŭ sama vicordo.

12052 Trakokurbiĝo kun kontinue ŝanĝiĝanta kurboradiuso, aplikata por atingi nur malrapidan anstataŭ abruptan kreskadon de veturila transversa akcelo kaze de transiro

- aŭ inter du diversaj konstantradiusaj kurbiĝoj

- aŭ inter rekta kaj konstantradiuse kurba partoj de trako.

bulgara	<i>крива преходна</i>	itala	<i>curva di transizione</i>
ĉeĥa	<i>přechodnice</i>	kroata	<i>prijelazni luk</i>
dana	<i>overgangskurve</i>	pola	<i>krzywa przejściowa</i>
franca	<i>courbe de raccordement</i>	rumana	<i>curbă de racordare</i>
germana	<i>Übergangsbogen</i>	slovena	<i>prehodna krivina</i>
hungara	<i>átmeneti ív</i>		



terminproponoj:

- 1) kurbigo transira (kiel ĝis nun)
- 2) trakokurbigo transira
- 3) trakokurbigo akcelmildiga

PIV: akcelo 2 Plirapidigo de fenomeno, ago ktp.

milda 2 Agrable impresanta la senton; malsevera, ne kontraŭstarema.

12135 Punkto ĉe trakforko – eble laŭ ties longo pluraj punktoj, kie okazas proporcia – eble sinkrona – movo de la trakforko per relkomutila regmekanismo.

ĉeĥa	<i>místo stavění výhybky</i>
dana	<i>sporskiftedrevplacering</i>
franca	<i>point d'attaque d'une aiguille</i>
germana	<i>Weichenstellort</i>
hungara	<i>váltóállító hely</i>
itala	<i>punto di attacco dello scambio</i>
kroata	<i>postavno mjesto na skretnici</i>
pola	<i>miejsce mocowania napędu zwrotnicowego</i>
rumana	<i>punct de atac al unui ac</i>
slovena	<i>mesto kretniškega pogona</i>



terminproponoj:

- 1) agopunkto de trakforka regmekanismo (kiel ĝis nun)
- 2) agopunkto de relkomutila regmekanismo
- 3) regmekanisma agopunkto (relkomutilo)

Esperante pri multnombraj kontribuoj de vi ĝis la kongreso en *San Benedetto* amike salutas *Heinz Hoffmann*.

Terminara Kuriero

TeKu 148

Februaro 2014

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør
Poŝtelefono: +45 71 70 63 83 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul
Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: hoffmann-ifef@cablemail.de

Bonvenigo de nova kunlaboranto

Karaj geamikoj, ĝoje mi povas informi, ke antaŭ jarfino kolego *Guido Brandenburg*, loĝanta en *Drensteinfurt* (Germanio) esprimis sian deziron kunlabori en nia Terminara Sekcio. En sia lasta profesia vivo li estis specialisto por signaltekniko. Li ankaŭ estas denaska esperantisto. Tutcerte lia kunago estas tre grava por bona fervoja faklingvo. Li estu bonvena en nia rondo.

Kontribuoj al taskoj en TeKu 147

Ĝis nun alvenis kontribuoj de *Guido Brandenburg*, *Ladislav Haki*, *Jaroslav Matuška*, *Erik Mortensen*, *Jan Uldal Niemann* kaj *Vito Tornillo*. Elkoran dankon al ili. Jena listo montras iliajn elektojn:

14512	5-foje	komutejo lokproksima mekanika
14609	5-foje	komutado per lokproksima komutejo
14611	3-foje	manovradzono malŝaltebla de regejo
14701	3-foje	komutejo lokproksima regpanela
	2-foje	komutejo lokproksima



Komutejo regpanela en *Samedan* (Svisio)